

N-ro 3

Septembro

1912


★ ESPERANTISTA ★  
GAZETO  
**DANLANDO**



Sub redakcio  
de  
**ANDR. NISSEN**



Eldonejo Esperantista  
**KOPENHAGO**





## Parolado de D-ro L. L. Zamenhof

ĉe la malfermo  
de la Oka internacia Kongreso esperantista.

**L**A unuaj vortoj, kiujn mi volas hodiaŭ eldiri al vi, karaj samideanoj, estas vortoj de kora gratulo, ĉar ni havas hodiaŭ grandan feston. Ĝus finiĝis dudek kvin jaroj de la tempo, kiam — post longa naska preparado — aperis publike la lingvo, kiu nin ĉiujn unuigas, por kiu ni ĉiuj laboras kaj kiu enkorpigas en si tiun homofratigan ideon, kiun la plimulto el ni havas en sia koro kaj kiu dum dudek kvin jaroj flame instigadis nin labori, malgraŭ ĉia malfacileco kaj ĉiuj malhelpoj.

Dudek kvin jaroj da laborado por Esperanto kaj por ĝia ideo! Tion povas plene kompreni nur tiuj personoj, kiuj partoprenis en tiu laborado de la komenco ĝis nun. Bedaŭrinde tre nemultaj estas tiuj personoj. El la laborantoj de la unua tempo tre multaj jam delonge plu ne vivas, aliajn lacigis la malfacila, grandan paciencon kaj persistecon postulanta vojo, kaj ili malaperis el nia anaro. El tiuj personoj, kiuj troviĝas nun en ĉi tiu ĉambrego, la grandega plimulto en la unuaj jaroj de Esperanto nenion sciis pri ĝi aŭ neklare aŭdis pri ĝi nur kiel pri ia freneza, mokinda kuriozaĵo; tre multaj el vi en la momento de la apero da Esperanto estis ankoraŭ infanoj; multaj, kaj certe ne la malplej fervoraj el vi, en tiu tempo eĉ tute ne ekzistis ankoraŭ en la mondo. La grandega plimulto el vi aliĝis al nia afero nur tiam, kiam ĝi estis jam sufiĉe forta kaj elprovita. Tre kaj tre malgranda, facile kalkulebla per la fingroj, estas la nombro de tiuj personoj, kiuj iris kun Esperanto de la momento de ĝia naskiĝo ĝis la nuna tempo. Kortuŝite ili povas nun rememori, kiel terure malfacila estis ĉiu paŝo en la komenco, kiam ĉiu aludo pri Esperanto postulis specialan kuraĝon, kiam el ĉiu milo da semoj, kiujn ni en plej primitiva maniero, sen helpo kaj sen rimedoj pacience ĵetadis en la teron, apenaŭ unu ricevis radikojn.

Dudek kvin jaroj! grandegan gravecon havas tia peco da tempo en la historio de lingvo artefarita. Lingvoj naturaj kreskas tute

## DANLANDO

trankvile, ĉar kun tia lingvo neniu kuraĝas fari iajn eksperimentojn aŭ fleksi ĝin laŭ sia gusto; sed pri lingvo artefarita ĉiu opinias, ke li havas rajton de voĉo, ke li povas aŭ eĉ devas direkti la sorton de la lingvo laŭ sia kompreno. En lingvo natura ĉiu eĉ plej granda efektiva malbonaĵo neniun incitas, eĉ neniun meditigas, kaj estas akceptata kun plena kontenteco aŭ rezignacio; en lingvo artefarita ĉio ŝajnas al ni kritikinda, ĉiu bagatelo, kiu ne estas konforma al nia gusto, pikas al ni la okulojn kaj vekas deziron de refarado. Lingvo artefarita dum longa tempo estas elmetata al senĉesaj ventoj, al senĉesa tirado kaj puŝado. Kiom da ventoj, kiom da senĉesa tirado nia lingvo devis suferi dum sia dudekkvinjara vivo! Se ĝi tamen ĉion sane eltenis, se malgraŭ ĉiuj ventoj kaj puŝoj ĝi dum dudek kvin jaroj vivis kaj kreskis regule kaj rekte, ĉiam pli fortiĝante kaj riĉiĝante, neniam fleksigante aŭ kripligante, neniam minacante disfali en dialektojn, sed ĉiam pli kaj pli fortikigante sian tute difinitan, ĉie egalan spiriton, neniam perdante hodiaŭ, kion ĝi akiris hieraŭ, — ni povas pri tio sincere nin gratuli.

Antaŭ dudek kvin jaroj mi timeme demandis min, ĉu post dudek kvin jaroj iu en la mondo scios ankoraŭ, ke ekzistis iam Esperanto, kaj — se Esperanto vivos — ĉu oni tiam povos ankoraŭ kompreni ion, kio estis skribita en Esperanto en ĝia unua jaro, kaj ĉu angla esperantisto povos kompreni esperantiston hispanan. Nun pri ĉi tio la historio donis jam plenan kaj perfekte trankviligan respondon. Ĉiu el vi scias, ke verko, skribita en bona Esperanto antaŭ dudek kvin jaroj, en plena mezuro konservas sian bonecon ankaŭ nun, kaj la legantoj eĉ ne povas diri, ke ĝi estas skribita en la unua jaro de ekzistado de nia lingvo; ĉiu el vi scias, ke inter la stilo de bona angla esperantisto kaj la stilo de bona hispana esperantisto en la nuna tempo ekzistas absolute nenia diferenco. Nia lingvo konstante progresas kaj riĉiĝas, kaj tamen, dank' al la *reguleco* de sia progresado, ĝi neniam ŝanĝiĝas, neniam perdas la kontinuecon kun la lingvo de tempo pli frua. Kiel la lingvo de homo matura estas multe pli riĉa kaj pli elasta, ol la lingvo de infano kaj tamen la lingvo de ĝuste parolanta infano neniom diferencas de la lingvo de homo matura, tiel verko, skribita en Esperanto antaŭ dudek kvin jaroj ne estas tiel vortoriĉa, kiel verko, skribita en la nuna tempo, kaj tamen la lingvo de tiu tempo perdis absolute nenion el sia valoro ankaŭ en la nuna tempo. Lingvo, kiu eltenis la provon dum dudek kvin jaroj, kiu en plej bona kaj ĉiam pli floranta stato travivis jam tutan

homan generacion kaj estas jam pli maljuna ol multaj el ĝiaj uzantoj, kiu kreis jam grandan, potence kreskantan literaturon, kiu havas sian historion kaj siajn tradiciojn, sian tute precizan spiriton kaj siajn tute klarajn idealojn, — tia lingvo ne bezonas jam timi ke io pereige depuŝos ĝin de tiu natura kaj rekta vojo, laŭ kiu ĝi evoluas.

La vivo kaj la tempo garantiis al nia lingvo naturan forton, kiun neniu el ni povas senpune malrespekti. La hodiaŭa jubileo estas festo de tiu vivo kaj tempo.

\* \* \*

Por ke ni, vivantoj, povu festi la hodiaŭan jubileon, fervore kaj sindone laboris multaj personoj, kiuj nun jam ne vivas. Nia morala devo estus rememori ilin en la nuna solena momento. Sed ho ve! ilia nombro estas tro granda, por ke ni povu ilin ĉiujn citi, kaj krom tio la pli granda parto el ili laboris tiel modeste, ke ni eĉ ne scias iliajn nomojn. Tial, por ne fari maljustan apartigon inter eminentuloj kaj ne- eminentuloj, mi citos neniun nomon. Mi devas fari escepton nur por nia kamarado Van-der-Biest, kies nomo estas ankoraŭ tro freŝa en la memoro ĉe ni ĉiuj, kiu en la pasinta jaro aranĝis kaj prezidis nian grandan ĉiujaran feston kaj kies morto estas sendube ligita kun tiuj grandaj laboroj kaj malagrablajoj, kiujn li prenis sur sin por ni ĉiuj. En via nomo mi esprimas funebran saluton al la ombroj de ĉiuj niaj karaj kamaradoj, kiujn dum la pasintaj dudek kvin jaroj forŝiris de ni la morto. Iliaj ombroj staru nun antaŭ niaj okuloj, kvazaŭ partoprenante en tiu granda festo, kiun ili preparis, sed ne ĝisvivis. Mi proponas al vi, ke ni honoru ilian memoron per leviĝo de niaj seĝoj.

\* \* \*

Nun, kiam la matureco de nia afero estas jam tute eksterduba, mi turnas min al vi, karaj samideanoj, kun peto, kiun mi jam antaŭ longe volis direkti al vi, sed kiun mi ĝis nun prokrastis, ĉar mi timis fari ĝin tro frue. Mi petas, ke vi liberigu min de tiu rolo, kiun mi, pro kaŭzoj naturaj, okupis en nia afero dum dudek kvin jaroj. Mi petas vin, ke de la nuna momento vi ĉesu vidi en mi „majstron“, ke vi ĉesu honori min per tiu titolo.

Vi scias, ke tuj en la komenco de nia movado mi deklaris, ke mi ne volas estis mastro de Esperanto, sed ke la tutan mastrecon pri Esperanto mi en tuta pleneco transdonis al la esperantistoj

## DANLANDO

mem. Vi scias ankaŭ, ke de tiu tempo mi ĉiam lojale agadis aŭ almenaŭ penis agadi konforme al tiu deklaro. Mi donadis al vi konsilojn, kiel mi povis, sed neniam vi aŭdis de mi la vortojn: „tion mi postulas“ aŭ „tion mi deziras“. Neniam mi provis altrudi al vi mian volon. Tamen, konsciante, ke ĝis sia plena fortikiĝo nia afero bezonas ian enkorpigitan standardon, mi — laŭ via deziro — dum dudek kvin jaroj plenumadis tiun rolon, kiel mi povis, kaj mi permesadis, kvankam tre nevolonte, ke vi vidu en mi ĉefon kaj majstron. Kun ĝojo kaj fierenco mi konstatas, ke vi ĉiam montris al mi sinceran konfidon kaj amon, kaj pro tio mi eldiras al vi mian plej koran dankon. Sed nun permesu al mi, ke mi fine formetu de mi mian rolon. La nuna kongreso estas la lasta, en kiu vi vidas min antaŭ vi: poste, se mi povos veni al vi, vi ĉiam vidos min nur inter vi.

Jen estas la kaŭzo, kiu devigis min fari la nunan decidon:

La ekzistado de ia natura konstanta ĉefo, eĉ se tiu ĉefo havas nur la karakteron de unuiganta standardo, prezentas gravan maloportunaĵon por nia afero, ĉar ĝi donas al la afero kvazaŭ personan karakteron. Se al iu ne plaĉas mia persono, aŭ miaj politike-religiaj principoj, li fariĝas malamiko de Esperanto. Ĉio, kion mi persone diras aŭ faras, oni ligas kun Esperanto. La tro honora titolo de majstro, kiun vi donas al mi, kvankam ĝi en efektiveco koncernas nur la aferon de la lingvo, fortenas de Esperanto multajn personojn, al kiuj mi pro ia kaŭzo ne estas simpatia kaj kiuj timas, ke, fariĝante esperantistoj ili devas rigardi min kiel sian moralan ĉefon. Ĉiu, kies opinio pri aferoj esperantistaj estas alia ol mia, ofte sin ĝenas, eldiri libere sian opinion, por ne kontraŭbatali publike tiun, kiun la esperantistoj nomas sia majstro. Se ies opinio la esperantistoj ne volas akcepti, li vidas en tio nur la ĉiopovan influon de la majstro. Nun, kiam nia afero estas jam sufiĉe forta, estas necese, ke ĝi fine fariĝu absolute libera, ne sole libera de ĉiuj personaj *dekretoj*, kia ĝi fariĝis jam antaŭ dudek kvin jaroj, sed ankaŭ de ĉia efektiva aŭ ŝajna persona *influo*. Estas necese, ke la mondo sciiĝu tute klare, ke Esperanto povas havi aŭ ne havi siajn libere elektitajn gvidantojn, sed ke ĝi posedas nenian konstantan *majstron*. Nomu min per mia nomo, nomu min fondinto de la lingvo, aŭ kiel vi volas, sed mi petas vin, ne nomu min plu „majstro“, ĉar per tiu morale tro liganta nomo vi malliberigas nian aferon.

Multaj el vi portas en sia koro la samajn idealojn, kiel mi, kvankam ne ĉiuj en tute egala formo; sed la mondo devas scii,

ke tiu spirita parenceco inter mi kaj vi estas laŭvola, ke la esperantismo ne povas esti responda pri miaj personaj ideoj kaj aspiroj, kiuj por neniu el vi estas devigaj. Se mi ion diras aŭ faras, kio ne estas konforma al la gusto aŭ konvinkoj de tiu aŭ alia el vi, mi deziras, ke tio neniu el vi ĝenu kaj ĉiu el vi havu la rajton diri: tio estas tute privata ideo aŭ frenezaĵo de Zamenhof, kaj ĝi havas nenion komunan kun la Esperanta movado, en kiu li estas nun persono tute privata. La interna ideo de Esperanto estas: sur neŭtrala lingva fundamento forigi la murojn inter la gentoj kaj alkiutimigadi la homojn, ke ĉiu el ili vidu en sia proksimulo nur homon kaj fraton. Ĉio, kio estas super tiu interna ideo de Esperanto, estas nur privataĵo, kiu povas eble esti *bazita* sur tiu ideo, sed neniam devas esti rigardata kiel *identita* kun ĝi.

\* \* \*

Antaŭ ol mi formetas de mi ĉian oficialan rolon en nia afero, mi ankoraŭ la lastan fojon admonas vin: laboru ĉiam en plena unueco, en ordo kaj konkordo. Ĉiujn dubajn demandojn, kiuj koncernas la tutan Esperantan aferon, kaj kiuj ne tuŝas la personon liberecon de ĉiu aparta esperantisto, solvu ĉiam pace, per regula interkonsiliĝo de viaj egalrajte elektitaj delegitoj kaj per disciplina cedo de la malplimulto al la plimulto. Neniam permesu, ke en nia afero regu la principo: „kiu pli laŭte krias, tiu estas prava“. Per unueco ni pli aŭ malpli frue certe venkos, eĉ se la tuta mondo batalus kontraŭ ni; per interna malpaco ni ruinigus nian aferon pli rapide, ol tion povus fari ĉiuj niaj malamikoj kune. Ne forgesu, ke Esperanto estas ne sole simpla lingvo, kiun ĉiu el ni uzas nur por siaj propraj bezonoj, sed ke ĝi estas grava *socia problemo*, ke, por atingi nian celon, ni devas konstante *propagandi* nian aferon kaj zorgi pri tio, ke la mondo havu *estimon* kaj *konfidon* por ĝi. Se en nia afero aperas io, kio ŝajnas al ni malbona, ni povas trankvile ĝin forigi per komune interkonsentita decido; sed ni neniam semu en nia tendaro reciprokan malamon kaj malpacon, kiu nur ĝoigas kaj triumfigas niajn malamikojn. En la unuaj jaroj de nia laborado sur nia standardo estis skribitaj la vortoj „espero, obstino kaj pacienco“; tio tute sufiĉis, ĉar ke ni, samideanoj, devas reciproke nin estimi kaj helpi, tio por ĉiu estis komprenebla per si mem. En la lastaj jaroj ni bedaŭrinde ofte forgesis tiun devon; tial nun, transirante en la duan gravan periodon de nia historio, en la duan kvaronjarcenton, ni skribu sur nia standardo novan vorton, kaj ĉi tiun

## DANLANDO

vorton ni ĉiam respektu kiel sanktan ordonon; tiu vorto estas: „konkordo“.

\* \* \*

Mi finis tion, kion mi intencis diri al vi, karaj amikoj. Mi scias tre bone, ke multajn el vi mia nuna parolo malagrabla seniluziigos. Kun maldolĉa sento de neplenumita espero vi eble demandos: ĉu en sia lasta kongresa parolo, en sia „kanto de cigno“, li nenion pli havis por diri al ni? ĉu en la grava tago de la jubileo de la esperantismo, de tiu jubileo, kiun ni atingis post tiom multe da laboroj kaj suferoj, li nenion pli havas por diri al ni? ĉu en la unua kaj eble ankaŭ la lasta fojo, en kiu ni el ĉiuj partoj de la mondo alproksimiĝis, kiom ni povis, al tiu loko, kie Esperanto naskiĝis kaj kie la atmosfero, saturita de intergenta malpaco per neevitebla natura reago naskis la esperantisman movadon, — ĉu en ĉi tiu grava kaj solena momento li nenion pli havis por diri al ni? Ho ne, miaj karaj amikoj, miaj karaj samideanoj kaj kunlaborantoj! Multe, multe, tre multe mi volus hodiaŭ diri al vi, ĉar mia koro estas plena; en la jubilea momento de la esperantismo mi volus paroli al vi pri tio, kio naskis la esperantisman, pri ĝia esenco kaj espereblaj sekvoj; sed hodiaŭ mi staras antaŭ vi ankoraŭ en rolo oficiala, kaj mi ne deziras, ke mia privata kredo estu rigardata kiel deviga kredo de ĉiuj esperantistoj. Tiel pardonu min, ke mi pli ne parolas.

Kio estas la esenco de la esperantisma ideo kaj al kia estontecko alkondukos iam la homaron la interkompreniĝado sur neŭtrale-homa, sengenta lingva fundamento, — tion ni ĉiuj sentas tre bone, kvankam ne ĉiuj en tute egala formo kaj grado. Ni donu do hodiaŭ plenan regadon al tiu silenta, sed solena kaj profunda sento, ni ne profanu ĝin per teoriaj klarigoj.

\* \* \*

Samideanoj! La antikva pola ĉefurbo, en kiu ni kunvenis, pretigis por ni gastaman akcepton, faris multe, por honori nian aferon kaj por agrabligi al ni nian restadon dum la kongreso. Mi esperas, ke, revenante en sian hejmon, ĉiu el vi kunportos kun si plej bonan rememoron pri tiu lando kaj urbo, kiujn la plimulto el vi ĝis nun verŝajne tre malmulte konis. Al la regno kaj lando, kiuj montris al ni sian amikecon, sed precipe al la estraro de la gastama Krakovo kaj al ĉiuj institucioj kaj personoj, kiuj donis al nia kongreso sian moralan kaj materialan subtenon, mi



esprimas en via nomo la plej koran dankon. Plej koran kamaradan dankon ni esprimas kompreneble antaŭ ĉio al la senlaca loka organiza komitato, kiu ne ŝparis laboron por la plej bona aranĝo de nia kongreso. Kaj nun mi deziras al vi ĉiuj gajan feston kaj sukcesan laboron.

## La VIII Internacia Kongreso Esperantista en Krakovo.

Nova paĝo en la granda libro de nia lingvo Esperanto estas nun skribita, sur ĝi staras la nomo Krakovo kun oraj literoj. Rimarkinde bela estis nia oka kongreso, inda monumento ĝi estas por la jubileo de Esperanto. En unueco kaj konkordo renkontiĝis ĉ. 1000 homoj de 32 nacioj; dum 8 tagoj ili praktike montris al la mondo la realigeblon de nia granda ideo, per unu sola lingvo ni diskutis la plej diversajn temojn kaj pro tiu unu sola lingvo ni sentis nin kiel fratoj, vanoj de unu sola tutmonda familio. V M

Alvenintaj al Krakovo oni tuj ricevis la impreson: ĉio estas en bona ordo por akcepti la kongresanojn. La akceptejo en la stacidomo tuj donis la necesajn klarigojn pri la loĝejoj kaj pri la ĉefa akceptejo en la *Komerca Akademio*. Tre praktike kaj oportune ĉio estis aranĝita en la granda akceptejo, ĉambroj por fakaj kunsidoj troviĝis en la sama loko kiel ankaŭ ekspozicio, monŝanĝejo, bufedo kun manĝaĵoj kaj trinkaĵoj, babilejo, ĉambro por ĵurnalistoj, kongresa sekretariejo, k. t. p. Sur nigraj tabuloj kaj afiŝoj la lastaj sciigoj kaj anoncoj ĉiam estis troveblaj.

La urbo mem estis en verdaj festvestaĵoj; grandaj flagoj, esperantaj, krakovaj kaj polaj pendis ekster fenestroj kaj montris la lokojn, kie la esperantistoj loĝas, aŭ kie okazas io rilate al Esperanto. Butikoj estis ornamitaj per Esp.-flagoj kaj steloj, kaj ĉie oni vidis Esp.-afiŝojn, certe neniam urbo vidis tiom da esperante skribitajn afiŝojn, estis vera ĝojo por la esperantistoj vidi tiom da firmoj uzi la lingvon Esperanto.

La elektraĵ tramoj estis ornamitaj per flagoj kaj girlandoj, la kongresa insigno rajtigis al senpaga veturado per la tramoj.

Di manĉon la 11. Aug. okazis en la malnova teatro la solena malferma kunveno. Kiam D<sup>ro</sup> *Zamenhof* sin montris sur la estrado, kie sidas la naciaj delegitoj, longa kaj entuziasma akلامo aŭdiĝis.

Anstataŭ la prezidanto de la pasinta kongreso, S<sup>ro</sup> *Van der*

## DANLANDO

*Biest Andelhof*, mortinta tuj post la kongreso en Antverpeno, Prof. *Bourlet* malfermis la kongreson kaj proponis kiel kongres-estraron: D<sup>ro</sup> *Mikolajki* (prez.) S<sup>ro</sup> *Chavet* (ĝenerala sekr.), D<sup>ro</sup> *Leono Rosenstock* kaj S<sup>ro</sup> *Rudnicki* (sekretj.). Prezidanto de la loka komitato estis Prof. *Odo Bujwid*, malnova studenta kamedrado de D<sup>ro</sup> *Zamenhof*.

D<sup>ro</sup> *Mikolajski* unue donis la parolon al la urbestro de Krakovo D<sup>ro</sup> *Szarski*, kiu esperante salutis la kongresanojn, kaj poste al la prezidanto de la Komerca Ĉambro.

Prof. *Bujwid* ankaŭ parolis direktante siajn vortojn al la reprezentantoj de la urbo Krakovo kaj al la gazetistaro dankante ilin pro la granda intereso montrita al la kongreso.

Post lia parolado D<sup>ro</sup> *Zamenhof* leviĝis por fari la ĉefan paroladon. Ĉiuj samtempe leviĝis de la seĝoj kaj per fortaj vivkrioj salutis lin kaj entuziasme oni kantis la himnon je lia honoro, kaj fine li povas komenci sian paroladon (vidu paĝon 33). Kiam Dr *Z.* sciigis, ke verŝajne ĉi tiu kongreso estas la lasta en kiu li partoprenas, tiam unuanime la tuta esperantistaro protestas, eble li je la unua fojo en sia vivo renkontas tian proteston de la esperantistoj. „Se mi venos“, li diris, „mi almenaŭ volas sidi inter vi kiel simpla kongresano“ (denove protesto).

Post la parolado de D<sup>ro</sup> *Z.* sekvas la vico de la la oficiale elsenditaj reprezentantoj.

Parolas: Subkolonelo *Gastomski* (la imperia kaj reĝa aŭstria-hungara ministerio de milito), S<sup>roj</sup> *Kraus* (urbestraro de Praha), *Krestanov* (ministerio por popola instruado en Bulgarujo), *Behrendt* (urbestraro de Breslaŭ), Monsinjoro *Gieswein* (hungara ministerio de popola instruado), *Fischer* (rumana ministerio de terkulturo kaj la urbo Galatz), *Nedosivin* (rusa ministerio de komerco kaj industrio), Kln. *Pollen* (la angla ministro de instruado), D<sup>ro</sup> *Schneider* (landa turista ligo de Krakovo), *Drobner* (pola universitato de Krakovo), kaj kiel speciala reprezentanto por la reĝino de Rumanujo, blinda esperantisto, S<sup>ro</sup> *Lévy*, transdonis grandan portreton de la reĝino al D<sup>ro</sup> *Zamenhof*.

Kiel kutime parolis poste reprezentantoj por la esperantistoj en la diversaj landoj.

Amaso da telegramoj alvenis i. a. de esperantistoj en Ŝanhaj. Telegramoj estis senditaj al la aŭstria imperiestro kaj la reĝino de Rumanujo.

Vespere oni kolektiĝis en la pafista domo kiel gastoj de la

## DANLANDO

urbo Krakovo, dum festa manĝado, kiun oni ĝuis starante, oni salutis malnovajn amikojn kaj ekkomencis novajn amikecojn.

Lundon komencis la grava laboro; ĉiuj fakaj kunsidoj (entute 45) okazis en la Komerca Akademio, la grandaj labor-kunsidoj de la kongreso en la malnova teatro sub la prezido de D<sup>ro</sup> *Mikolajski*.

Pro manko de loko en nia malgranda gazeto mi nur mallonge raportos pri ĉi-tiuj kunvenoj; en „Oficiala Gazeto“ kaj „Kongresa Dokumentaro“ pli detalaj raportoj troviĝos, kiujn mi petas al la legantoj legi.

Rilate al la demando pri la rajtigitaj delegitoj kiuj pagis, kaj tiuj kiuj ne pagis, oni post voĉdono permesis al la laste diritaj partopreni en la voĉdonado dum ĉi-tiu kongreso, se ili nur prezentos rajtigilon de la societoj. Ĉar multaj personoj ne klare komprenis, kial ili devas pagi al „Centra Oficejo“, S<sup>ro</sup> *Bourlet* detale klarigis tion. Li montris, ke oni povas dividi la fakojn de „C. O.“ en du partojn t. e. la oficialaj absolute necesaj fakoj kaj la utilaj, sed ne absolute necesaj fakoj. La unuaj devas nepre esti zorgataj, kontrolataj kaj pagataj de la esperantistoj mem kaj ne kiel antaŭe de malavaraj privatuloj. S<sup>ro</sup> *Bourlet* skizis la jenan buĝeton, kiu laŭ lia opinio estas sufiĉa por la subtenado de la oficialaj fakoj („Lingva Komitato“ kaj „Akademio“, „Konstanta Kongresa Komitato“, „Oficiala Gazeto“):

### Enspezoj:

Kotizoj de 30,000 esperantistoj.....	3.000 Fr.
2.000 abonoj al Oficiala Gazeto .....	10.000 „
	Sumo.. 13.000 Fr.

### Elspezoj:

Por enkasigo de la enspezoj .....	1.300 „
Salajroj .....	3.000 „
Loĝejo kaj ĝeneralaj elspezoj.....	1.200 „
Presado de Ofic. Gazeto .....	3.600 „
Sendado - — — .....	1.200 „
	Sumo.. 10.300 Fr.

Por administri la monon ni ja jam havas la Administran Komitaton, kies membroj estas laŭleĝe elektitaj de la naciaj societoj.

De la 1 Jan. 1913 la prezidanto de „C. O.“, Generalo *Sebert*, transdonos al la esperantistaro ĉi-tiun parton de „C. O.“ tute sen ia ŝuldo, kaj la esperantistaro mem kontrolos la financon staton.

Rilate al la demando pri ĝenerala organizo oni estis devigataj

## DANLANDO

prokrasti la decidon pri ĝi ĝis la venonta kongreso, pro tio ke la subkomisio ne finis siajn autaŭlaborojn je difinita tempo. La komisio daŭrigos siajn laborojn; jam estas esploritaj ĉ.80 proponoj.

Lundon okazis je la vespero en la malnova teatro la jubilea festo. El la riĉenhava programo mi speciale volas citi: la festparoladon de *Leo Belmont*, la belegan kantadon de la fama kantistino *Ada Sari*, la lertan deklamadon de la konata aktorino *Wysocka*. Granda orkestro de la 100 regm. inft. belege ludis sub la direktado de kapelestro *Sitter*, kaj la krakova vira ĥoro kantis jubilean kanton de *Grabowski*. Estis entute vere unuranga prezentado, inda jubilea festo por nia lingvo.

Mardon okazis granda komuna ekskurso al la famaj salminejoj de *Wieliczka*. Per speciala vagonaro kun 25 vagonoj la esperantistoj alvenis al la stacidomo, kie la urbestro *Aywas* kaj la urba konsilantaro atendis ilin kaj salutis ilin en esperanta parolado.

Neforgesebla estas la vizito en la subtera urbo, kie ĉio estas arte skulptita el salo. Oni preskaŭ ne kredas siajn proprajn okulojn, kiam oni ŝtaras en subtera kapelo, kie la altaro, statuoj de sanktuloj, kolonoj k. t. p. estas el salo, aŭ kiam oni eniras grandegan balsalonon kaj vidas centojn da kandeloj brili en grandaj kronoj faritaj el salo. Ĉe la tonoj de la mineja orkestro la esperantistoj dancis tie 120 metrojn sub la tero. Longa kaj laciga estis la subtera promenado, granda estis tial la ĝojo, kiam alvenintaj al la tielnomita stacio *Goluchowski* longaj tabloj kun manĝaĵo kaj trinkaĵo atendis nin. Post malgranda ripozo tie la supren rampado komencis kaj sur la vojo ni preterpasis subteran lagon, sur kiu orkestro ludis la solenan „Dio Patro“; grandiosa estis la impreso, ĉiu malkovris la kapon, dum la poloj kantis la belegan himnon. Por honorigi la esperantistojn la minoj estis lumigitaj per arta fajraĵo, miloj da kandeletoj kaj lanternoj kun verdaj steloj. Per liftoj oni fine atingis la supraĵon de la tero.

Merkredon vespere okazis en la nova urba teatro la prezentado de la tragedio „Mazepo“ de *Slovacki* tradukita de *Grabowski*. La krakovaj profesiaj geaktoroj, kiuj ĉiuj lernis Esperanton, tre lerte ludis kaj parolis la lingvon, kvazaŭ ĝi estas ilia gepatra lingvo. Grandaj ovacioj sekvis la prezentadon, ĝis la tradukinto sin montris sur la scenejo por danki la geaktorojn. Denove ovacioj kaj vivkrioj por Dro Zamenhof, ĉiuj kantas la himnon kaj scivolemaj maŝinistoj, vestadistoj kaj aliaj homoj, kies laborloko estas malantaŭ la kulisoj, subite aperas sur la scenejo tute senĝene kaj partoprenas en la aplaŭdo.

Jaŭdon okazis diservo en Esperanto en la katolika preĝejo de Sct. Maria, en la protestanta preĝejo kaj en la hebrea sinagogo. En la katolika preĝejo la esperantistoj estis ricevintaj permeson meti la verdan standardon ĉe la ĉefan altaron.

Ĉar ne okazis kunsidoj tiun tagon, la esperantistoj vizitis la diversajn vidindaĵojn de la urbo ekz. muzeojn, la kastelon de Vavel kun la katedralo, en kiu estas la tomboj de la polaj reĝoj, aŭ oni ekskursis al la monteto de Kosciuszko aŭ al la ĉevalkurado, al kiu la esperantistoj estis invititaj.

Posttagmeze la premioj de la literatura konkurso estis disdonataj en la „Arĥitektura Ekspozicio“ kaj vespere okazis la granda internacia balo en la malnova teatro. Antaŭ la balo Sro *Mudie* estis aranĝinta komunan manĝadon laŭ pola maniero.

Pli strangan manĝaĵon mi neniam en mia vivo vidis antaŭ balo: La barĉo (terura akcidaĵo), grasaj kolbasoj kun brasiko kaj fine ia speco da kuko. Mi manĝis sekan panon, ĉar mi deziris revidi mian familion kaj patrolandon.

Tre interese estis vidi la diversajn naciajn kostumojn; kun la plej granda vigleco la poloj dancis sian nacian „mazuron“ tiel, kiel nur poloj povas danci ĝin. Grandan gajecon vekis Dro *Rosenstock*, kiam li aperis vestita kiel Napoleon kun du francaj oficiroj post si (Dro R. multe similas Napoleon).

Vendredon oni daŭrigis la laborkunsidojn, kaj vespere oni ree iris en la teatron, ĉi-tiun fojon por aŭskulti operon, nome la mirinde belan „Halka“ de *Moniuszko*, tradukitan de *Grabowski*. La operistoj de Lwow, kiu dum la somero kantas en Krakovo, ĉiuj belege kantis kaj ludis la rolojn. La dolĉa muziko kaj la kortuŝanta teksto faris neforgeseblan impreson al la aŭskultantoj. Ankaŭ ĉi tiun fojon oni aplaudis, ĝis *Grabowski* sin montris sur la scenejo por danki la gekantistojn, kiuj estas la unuaj, kiuj kantas operon en Esperanto. La ĉarma opero meritas esti konata ankaŭ ekster Polujo.

Sabaton okazis la fermkunsido de la kongreso. Antaŭoni disigis, oni voĉdonis pri la loko de la venonta kongreso, la invito de Italujo estis akceptata, tiel ke la naŭa okazos en Genova. Dro *Stromboli* jam komencis varbi partoprenantojn kaj hejmen vojaĝis kun listo de 115 nomoj, tre bona rezultato. Sro *Bourlet* en la nomo de la francaj esperantistoj invitis al la deka kongreso en Parizo sed postulis du jarojn por la antaŭpreparoj, ĉar li atendas almenaŭ 4000 partoprenantojn, tial la kongresanoj ankaŭ voĉdonis pri tiu kongreso kaj akceptis Parizon. Sekvis

## DANLANDO

ankoraŭ invitoj por la dekunua kongreso, sed pri tiu la kongreso ne tiel frue volas okupi sin. Ankaŭ diversaj invitoj al postkongresaj tagoj en pli aŭ malpli proksimaj urboj estis prezentataj al la kongresanoj. Unu el la plej allogaj invitoj estis al *Zakopane*, urbeto en la Tatrajmontoj, mi sekvis ĝin kune ĉ. 70 esperantistoj, kaj en la venonta numero mi priparolos ĉi-tiun ĉarman ekskurson.

La vico de la parolantoj estis longa ĉe la fina kunveno, nur malvolonte oni disiĝis; dirante adiaŭon oni ĉiam sentas inklinon esprimi siajn internajn sentojn kaj montri sian dankemon al amindaj gemastroj.

Dro *Rosenstock*, kiu en la komenco de la kongreso tute perdis sian voĉon (spritulo skribis sur la nigra tabulo: Kiu povas trovi la belan voĉon de nia kara napoLeono Rosenstock), feliĉe retrovis ĝin, tiel ke li en tre sprita parolado povis danki kaj adiaŭi la gastojn. Grandaj ovacioj sekvis la paroladon de la ŝatata doktoro, ĉiuj ja sciis, ke li estis la vera animo en la kongresa organiza komitato, kaj ke li kun vere napoleona talento aranĝis ĉion.

Dro Zamenhof fine diris kelkajn dankvortojn kaj starante oni je la lasta fojo kantis la himnon.

Dum la vespero okazis la lasta amuzaĵo, nome „Varietea Presentado“ en „Teatro de Novaĵoj“. Tiuj esperantistoj, kiuj ne ankoraŭ estis tro lacaj, fidele ĉeestis ankaŭ tie.

Por tiuj esperantistoj, kiuj nur venis al la kongreso por amuzi sin, estis ankaŭ prizorgata; gvidantoj ĉiutage venis al la akceptejo je difinita tempo por montri al ili la belan urbon kun ĝiaj multaj interesaj historiaj memoraĵoj.

Ĉie oni sentis, ke la urbo bone antaŭ preparis la viziton de la esperantistoj; kelneroj, policianoj, tramvoĵaj konduktoroj kaj multaj aliaj personoj parolis Esperanton kaj rimarkinde estis, ke granda multo da infanoj flue parolis la lingvon.

Fariĝos malfacila tasko por la itala komitato superi la krakovan kongreson.

Kiu vivas, tiu vidos!

*Margrethe Noll.*



## Nia Lando

Reprezentantarkunveno en C. D. E. L. (7/9 1912). La tagordo estis:

1. De la antaŭa kunveno:

a. Raporto de la komitato por la jarkunveno 1912.

b. Sciigo de la prezidanto.

c. La jarkunveno en 1913.

2. Pritrakto de l'propono de *Fino* Knudsen pri la nacia himno.

3. Propono pri pago al Centra Officejo (Paris).

4. „Centra“ kaj U. E. A.

Punktoj 3 kaj 4 estis proponoj de *Sro* Ad. B. Hansen, la unu el niaj rajtigitaj deligitoj je la Krakova kongreso.

laŭ 1 a. *Fino* Rasmussen en la nomo de l'komitato donis raporton pri la jarkunveno en Vejle. Krom la invititoj, partoprenis 68 personoj entute, 15 de Kopenhago, 8 de Vejle, 5 de Aarhus, 9 de Horsens, 11 de Odense, 7 de diversaj danaj urboj kaj 13 eksterlandaj gesamideanoj. La defcito estis 54,74 kr.; por plimalgrandigi tiun-ĉi defciton „Centra“ ricevis du donacojn, respektive 10 kr. kaj 5 kr., sed tamen la defcito estas la plej granda, kiu ĝis nun okazis je la jarkunvenoj. La reprezentantoj aprobis la raporton.

laŭ 1 b. *Sro* Nissen ne deziris la vorton, ĉar la sciigo nuntempe ne havas valoron.

laŭ 1 c. *Sro* Dro dentisto Mejndor, Aarhus, aliĝas al la komitato por la venonta jarkunveno. La aliaj komitatanoj estas *Sro* Etzerodt, Aarhus, *Sino* Lindow (sekretariino por la jarkunveno); *Fino* Astrid Rasmussen kaj *Sro* Nissen, ĉiuj el Kopenhago. Cetere oni ne pritraktis la jarkunvenon, ĉar la komitatanoj en Aarhus deziris, ke „Centra“ prokrastu la aferon, ĝis oni ricevos proponojn de ili.

laŭ 2. La reprezentantoj opiniis, ke „Centra“ ne estas kompetenta decidi tiun-ĉi demandon; sed ŝajnis al la anoj pli bone, se *Fino* Knudsen mem je ĝeneralkunveno aŭ simila kunsido atentigus sian proponon.

laŭ 3. *Sro* Hansen proponis, ke C. D. E. L. klopodos pagi al Centra Officejo por ĉiuj anoj de la kluboj, kiuj aliĝas al C. D. E. L., por ke ni havu rajtigotajn delegitojn tiel multajn kiel eble. Cetere li proponis ke tiun-ĉi pagon C. D. E. L. rehavos de

## DANLANDO

la klubanoj; sed kiamaniere tio povos okazi, la reprezentantoj pritraktos dum alia kunveno.

laŭ 4. Sro H. sciigis, ke U. E. A. dum sia kongreso en Krakovo decidis kunlaboradon kun la naciaj ligoj pri aferoj de komuna intereso. „Centra“ simpatiis la ideon, kiun oni intencas esplori.

La venonta reprezentantarkunveno okazos la 5an de oktobro.

Cetere mi referencas al la raporto, kiu la 14an de septembro estas sendita al la kluboj, kiuj aliĝis al C. D. E. L.

*Astrid Rasmussen,*  
sekretariino.

**Aarhus.** Je la lasta ĝeneralkunveno en „Konversacia Klubo de Aarhus“ Sro dentkuracisto *Mejndor* estis elektata je prezidanto, bibliotekoficisto *Heilskov* je vicprezidanto kaj oraĝisto *Etzerodt* je sekretario kaj kasisto (reelekto). La klubo nun havas sidejon en „den folkelige Forsamlingsbygning“, Østergade.


Sabato la 21. Sept. okazis laŭ invito de la „Instruista Societo en Aarhus“ diskuto pri Esperanto kaj Ido.

Oficialaj paroladistoj estis por Esperanto la vicprezidanto de „Konversacia Klubo de Aarhus“ Sro cand. phil. *Heilskov*, por Ido Sro superinstruisto *Sv. Sveinbjørnsson* ĉe la katedrala lernejo en Aarhus, agento de la „Uniono“ idista. Sro Sv. unue parolis kaj atakis Esperanto kaj la esperantistojn. Kvankam li nur havis permeson paroli dum  $\frac{3}{4}$  h., li uzis duonon horon pli multe kaj tiamaniere forrabis la tempon de la esperantistoj. Sro Heilskov tamen en la malmulte da tempo bonege defendis nian lingvon kaj per bonaj argumentoj montris ĝian superecon.

Ankaŭ parolis la du konataj esperantistoj Sro *Etzerodt* (Aarhus) kaj kapitano *Aae* (Horsens) kaj nova fervora samideano instruisto *Hvorslev*; ĉiuj rifutis la erarajn argumentojn de Sro Sv., kiu ne poste deziris defendi sin, sed forlasis la ĉambron kiel venkita viro. Ĉar li en sia parolado eĉ insultis la prezidanton de Konversacia Klubo, Dro *Mejndor* pro artikolo en „Aarhus-posten“, kiu enhavis kelkajn neĝustaĵojn, Dro *Mejndor* tre afable klarigis al li, ke la artikolo estas intervjuo, kaj ke li mem ne diktas la intervjuojn al la ĵurnalistoj.

Eble Sro Sv., kiu skribas en diversaj gazetoj pri Ido, nun volas ĉesi sian dissemadon de lingvo, kiun li ne povas defendi.




**Bibliografio.**

**Das Esperanto ein Kulturfaktor** (Adler & Borel Dresden -A 1, Struvestrasse 40). Odaze de la VII Germana Kongreso en Danzig-Zoppot la Germana Esperanto Asocio elsendis bonegan libron, kiu plenumas ĉiujn postulojn al propagandilo, Dro *R. Ledermann*, Augsburg lerte redaktis la libron, kies riĉa enhavo povas esti utila al propagandistoj; multaj bonaj konsiloj troviĝas en ĝi, sribitaj de spertaj samideanoj. Speciala fako pritraktas „Armilojn por Esperanto“; Prof. *P. Christaller* dedikas la armilojn al „fidelaj kunbatalantoj“. La nomo de Prof. C. estas garantio por la taŭgeco de la armiloj. Ni insiste rekomendas al niaj legantoj aĉeti la libron. La preso estas 1 Sm.

**Hispanaj Dramoj** de *Jacinto Benavento* (Møller & Borel) Esperanta Biblioteko Internacia. Prezo 10 Sd. La tri verketoj: „La domo de feliĉo“, „La servanto de Don Juan“ kaj „La paperujo“ estas bonege tradukitaj de nia konata samideano *Vincente Inglada*, kiu jam tradukis plurajn verkojn de J. B. ekz: „La Angora Katino“, „Kruela adiaŭo“, „Princino Bébé“ k. c.

La artefarita „Altmontarsun“-bano, nova kuracmetodo de Dro med. *Breiger*, Berlin, fakkuracisto por fizikaj kuracmetodoj kaj lumterapio.

En maniero por ĉiuj komprenebla la doktoro klarigas la efikojn de la lumo, por montri kiel grava lumterapio estas por la publika bonfarto. Sufiĉe detale li instruas la legantojn pri la praktikaj spertoj kaj observoj, kiujn li faris dum sia 12 jara okupado pri lumkuracado. La ŝajne neklaraj sed tamen tute naturaj procedoj ĉe la lumefiko, kiuj ĉiam baziĝas sur fiziologiaj kaj ĥemiaj leĝoj ofte faris verajn miraklojn dum kuracado. La broŝuro meritas esti konata kaj de malsanuloj kaj de sanuloj. (Adler & Borel, Dresden. Prezo 20 Sd.).

**Tutmonda Jarlibro Esperantista 1912**, eldonita de Centra Oficejo, Prezo 1 Sm.

Tre ampleksa verko estas nia jarlibro de 1912.

Tre interesa fako de la libro estas la Esperantista Dokumentaro, kiu prezentas la regularojn k. t. p. de niaj oficialaj institucioj. En la fako „Regionaj Propagandaj Asocioj“ oni aldonis


## DANLANDO

ĉe ĉiu urbo mallongan sciigon pri la nombro de la loĝantaro, la specialaĵoj, la rimarkindaj konstruaĵoj de la urbo. La verko estas vere utila, ĉiu esperantisto devus posedi ĝin en sia biblioteko; se iu persono dubas pri la disvastiĝo de Esperanto, oni bezonas nur montri al li la jarlibron.

**Mimosa**, vendejo de fotografaĵoj, Niels Hemmingsensgade 2, ĵus eldonis „Gvidlibro pri fotografado“ en dana lingvo, speciale por komencantoj. La malgranda verko, kiu ankaŭ enhavas katalogon pri la specialkomercaĵoj de la magazeno, donas plenan informadon pri la nefacila arto, kiu la fotografado ja estas. Ĝi enhavas ĉiujn la fundamentajn regulojn, kiuj estas necesaj por ĉiu, antaŭ ol oni daŭrigas je la diversaj rafinacoj kiel karbobildoj, kolorfotografaj k. t. p. La posedanto de la firmo pli poste pritraktos tiujn ĉi temojn per malgrandaj kajeroj, kiujn li elsendos al siaj klientoj senpage por per tiuj helpi ilin al pli granda lerteco.

La gvidlibro estas grava kaj bona kaj skribita en facilkomprenebla lingvo kun vico de klarigantaj kaj belaj ilustraĵoj. La vendad-principo de la magazenedanto estas tre nobla; li nome diras: „La artiklojn, kiujn mi nomas unuaklasaj kaj bonaj, mi ne laŭdas pro tio, ke mi ilin havas, sed mi ilin havas, ĉar ili estas bonaj kaj unuaklasaj“.

Nigro



Blanko

## Ŝako.

### Problemo 2

de *H. O. Nissen*, Kopenhago (originala)

Ekludante, Blanko matos per la 2-a movo.

## *Hotel-Adresaro.*

Odense, Hotel Ansgar.

### **Biskvitoj** kaj **Mielkukoj**

Bona biskvito, mastraja biskvito, sekala biskvito kaj mielkukoj.

Skribu al la farejo de  
**F. Holle,**  
Aalborg, Danujo.

Laŭpete mi sendas **senpage** (se la provizo sufiĉas) paketon kun unu el la tri artikoloj.

### **Ilustrita** **Gvidlibro** **pri Vejle**

havebla ĉe

*Eldonejo Esperantista*  
Strandgade 11,  
Kopenhago.

==== Prezo: 35 Øre ====

(aŭ 2 respondkuponoj).

KØBENHAVNS PARAPLYFABRIK

Østergade 58.

**Bastonoj kaj Ombreloj**  
- - - je ĉiuj prezoj - - -

*Telefon 8610.*

*Telefon 8610.*

## Esperanto-Oficejo

(Esperanto-Kontor) U. E. A.

**Bredgade 35, København.**  
(Kopenhago)

Bela poŝa ŝtampilo (la emblem-  
desegno) kun kuseno.

Prezo: Kr. 2,50 (sm. 1,500).

Ŝtampilo: (la verda stelo). Nur:  
35 Øre (25 sd.).

Kuseno: 35 Øre (25 sd.).


### :: Propagando-markoj ::

(folio po 100 ekz.).

Prezo: Kr. 1,00 (sm. 0,60).

Emblemoj, leterpaperoj, kovertoj,  
poŝtkartoj, silkflagetoj, propagand-  
iloj, k. t. p.

## C.M. Hess, Vejle.



Fornoj laŭ desegn-  
ajo de konataj  
danaj artistoj en  
plejgranda elekto.

### Ŝirmfornoj

tre elegante  
nikelumitaj.

Kuirfornoj, kaj iz-  
ole starantaj kaj

por enmurigo kiel ankaŭ  
por hoteloj. Ĉiu speco de  
fandajkonstruaĵoj.

**Plej malkara kaj plej  
bona fabrikaĵo.**



## AMATOROJ!

Aĉetu viajn  
fotografajn bezonaĵojn ĉe

## MIMOSA

**Kopenhago,**  
Niels Hemmingsensgade 2.



Redakcio kaj Administracio: Strandgade 11, Kopenhago.  
Abonprezo: En Danlando 2 Kr. En eksterlando 3 Kr. po jaro.

Alt  
**Bogtryk**  
hurtigst  
billigst

Harald Jensens  
**Bogtrykkeri**  
Admiralgade 24  
Tlf. 5199